80-jariĝo de Elda Corrado – festo por Breŝa Esperanto-Grupo [80° compleanno di Elda Corrado: festa per il Gruppo Esperantista Bresciano]

Gruppo Esperantista Bresciano
Breŝa Esperanto-Grupo

La 20an de majo 2018 kelkaj membroj de Breŝa Esperanto-Grupo faris surprizon al **Elda Corrado,** triesta esperantistino longtempe loĝinta en Milano, de kelkaj jaroj en Breŝo kun la filoj -denaskuloj- Alessandro kaj Flaviano kaj la † edzo Glauco. Al Glauco estas dediĉita esperanto-biblioteko en Milano.

La okazo estis ŝia **80-jariĝo**, okazinta jam la 27an de marto sed ankoraŭ ne festita fare de BEG.

Ni organizis tagmanĝon ĉe la breŝa restoracio *"La Du de la Kvartalo"*, kiun kelkaj rememoros kiel agrablan sidejon dum la 100-jara Zamenhof-jubileo en aprilo 2017.

80-jariĝo de Elda Corrado – festo por Breŝa Esperanto-Grupo [80° compleanno di Elda Corrado: festa per il Gruppo Esperantista Bresciano]

La surprizo plene sukcesis. Krom esperantaj libroj, la festatino ricevis bondezirkarton eĉ de Humphrey Tonkin.

80-jariĝo de Elda Corrado – festo por Breŝa Esperanto-Grupo [80° compleanno di Elda Corrado: festa per il Gruppo Esperantista Bresciano]